



Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 34^a jaro



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k122/k122.html>

Se oni malamas, oni timas

Putinofobio

Defendo de hispaneco



Voĉmesaĝejo 2^a Sen Limoj

N^o 122^a

januaro 2022

Kajeroj**el la Sudo**

Bulteno de la Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj (HALE).

Enhavo

Redaktore: Iom malfrue.....	3
Socialo:	
Putinofobio.....	4
Movado:	
Voĉmesaĝejo 2 Sen Limoj.....	9
Politiko:	
Pri tiuj reĝoj diritaj Borbonaj.....	10
Literaturo:	
Historio de instruistino.....	15
Sanigaj murdoj: Rekonkero....	16
Defendo de Hispaneco.....	20

Calle Jabonerías, 6.3º D
30010 Murcia
Hispanio

ISSN 1886-1938 (printita)

Prezidas: **Johano A. Cabezos.**

Redaktas: **Jesuo de las Heras.**

Korektas: **Jozefo Pina.**

Retskribu al: kajeroj@gmail.com

**Pri la enhavo de la
artikoloj respondecas ties
aŭtoroj, ne la redakcio.**

**Ni ne korespondos pri nepetitaj
artikoloj, kvankam ni klopodos
publikigi ĉiun artikolon, kiun ni
trovos interesa kaj kies enhavo
mistraktas nenium personon.**

Kovrilo: De la tuta historio de Homaro estas batalo kontraŭ la plej malnova metio el la mondo, Prostitutado. Sed ĉu prave? Niaj gelegantoj estas invititaj pripensi la aferon kaj reagi, se decas.

Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €10 jare por ricevi la surpaperan version de nia magazino.

Nesubskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

**Se vi deziras kontibui per aliĝo,
kontaktu la redaktoron:
kajeroj@gmail.com**

**Oni povas reprodukti la enhavon, kondicè,
ke oni citu la originon.**

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj:
Scribus, Bluefish, BlueGriffon, Gimp, kaj Cyberduck.



Redaktore

Iom malfrue, tamen ne sengrave

Kun iom da prokrasto venas ni denove antaŭ vi, leganto. Diversaj sankialoj malebligis la aperon de nia kara magazino je sia akurata tempo, sed feliĉe tio jam ŝanĝis.

Ĉe la sekvantaj paĝoj vi trovos la ĉeftemon de nia numero: **putineco**. Jes, mi opinias, ke oni devas defendi la valoron de tiu aĉa —ĝis nun— vorto en la hispana, kiun oni uzas por fifamigi ĉion, de ideo al homo, ne forgesante materialajn aferojn. Sed oni decigas vorton per ties utila kaj respektinda uzoj en etosoj, kie oni neniam antaŭe uzis. Kiel metiistoj, putinoj ne havas ion envii al aliaj metianoj, ĉar sklaveco ne fremdas, bedaŭrinde, al ili: de kudristinoj al instruado kaj aliaj profesioj. Kiuj ne aŭdis pri geinstruistoj, kiuj laboras por privataj lernejoj kontraŭ tro malmulte da mono? Ĉu tio ne estas malvirtigisian profesion? Tamen, oni devas manĝi ĉiutage, ĉu ne? Kaj tion fari postulas fojfoje labori kiel sklavon... Mi memoras profesorinon pri la angla, kiu diris al mi, ke ŝi edziniĝis kaj forgesis pri instruado, ĉar ĉe sia lernejo oni donis al ŝi horaron kun multe da *truoj*, tio estas, horoj senklasaj inter horoj kun klaso, kaj *ĉar ŝi jam estas tie, ŝi devas anstataŭi profesoron, kiu tiun tagon ne venis, aŭ fari diversajn aliajn laborojn por la lernejo...*

Kompreneble, ŝi povintus rifuzi tion fari, sed..., ĉe la sendunga vico estas aliaj instruistoj, kiuj ne obĵetos al tio. Ankaŭ estas kudristinoj —ĉefe senlegitimaj enmigrintinoj—, kiuj devas labori dek aŭ pli horojn tage kontraŭ mizera salajro. Kompreneble, tio ĉi estas kontraŭleĝa —strange ne tio pri profesoroj—, kaj tio ja estas sklaveco, same kiel tio, kio okazas al senlegitimaj enmigrintoj, kiujn oni devigas putiniĝi. Do la **malmorala** afero kontraŭ virinoj **ne estas putineco**, sed **sklaveco**. Sed hipokrita socio nia unuigas la duan metion, kaj ne la unuan. Neniu protestas, ke oni ne devas aĉeti vestaĵojn, pro tio, ke ekzistas sklavinoj kudraj, sed tamen protestas kontraŭ tiuj putinaj.

Ni ankaŭ legos pri la lasta dinastio reĝa de Hispanio. Oni ne devas juĝi reĝecon pro nur unu dinastio, ĉar Hispanio neniam estis tiom grava kiel dum la reĝo de la antaŭa dinastio, tiu Aŭstria. Kaj tamen ne tiom malbone faris tiu ĉi Borbona.

Kiel promesite, ni ankaŭ legos pri hispaneco kaj ties defendo, fare de la plumo de Ramiro de Maeztu, fama hispana pensisto mortigita de maldekstruloj dum la Hispana Intercivitana Milito, je 1936.

Socialo

Putinofobio

De kiam homaro ekzistas, estas virinoj, kiuj komercas per siaj korpoj. Nun estas hipokritoj, kiuj diras, ke *virinoj rajtas fari ĉion ajn, kion ili volas, kun siaj korpoj* (mia korpo, mia decido), sed samtempe ili diras, ke *prostituado estas malpli altigo de virinoj, kaj sekve ili ne povas disvendi siajn favorojn*. Tio, laŭ mi estas profunda hipokriteco kaj totalismo: se virino povas fari tion, kion ŝi volas pri sia korpo, tio signifas, ke ŝi ankaŭ povas disvendi ĝin po horoj cele al seksa plenumado de viro, kiu bezonas ĝin.

Sed ŝajnas, ke memdiritaj progresemuloj, kiuj reguligas samseksemcon kaj disvendas la aferon kiel avantaĝon socialan, rifuzas fari la veran avantaĝon socialan: leĝigon de prostituado. Tio ja estos moderna ago, kiu neniu regresisma societo iam faris. Leĝigo de samseksemeco estas tiel anktikva kiel Sodomo kaj Gomoro, je antaŭ kvin mil jaroj. Poste ĝi estis malpermesita de judismo, kristanismo kaj islamismo, sed inter ni, en Eŭropo, samseksemuloj ne estis fizike punitaj pro tio, male al regresismaj societoj, kiuj vivas laŭ islamismo en la mondo aktuala. Prostituado, tamen, estis kaj estas tolerataj en la tuta mondo, krom en *progresismaj* Eŭropo kaj Norda-

meriko, kie oni volas nun persekuti la klientojn kune kun la **laboristinoj de amo**.

Tamen, mi opinias, ke homoj publikaj, tio estas, politikistoj, estas pli perfidaj kaj fiaj ol virinoj publikaj, tio estas, putinoj.

Ĉar tiuj ĉi donas tion, kion ili promesas, kontraŭ pago. Tiuj aliaj, tamen, promesas ĉion kaj donas nenion al tiuj, kiuj mone sub-



tenas ilin. Do, mi ne malpermesus inojn publikajn, sed homojn publikajn. Ili ne utilas al societo. Putinoj utilas. Pro tio oni devas peti, ke publikaj homoj ĉesu sian persekutadon de *virinoj publikaj*. Kompreneble, oni devas persekuti sklavecon kaj seksan kaj neseksan, kaj pro tio leĝo devas garantii, ke gelaboristoj ne devige devos labori pli ol 40 horojn semajne, kaj ke ili estos pagataj po ĉiu horo, kiujn ili efektive laboras, finigante tiun honton kaj socialan makulon tiom ofta ĉe ni pri kontraktoj pri kvar

horoj tage pagataj, sed tamen devigante la laboristojn —eksterkontrakte— labori duoblan tempon sub la minaco esti maldungotaj ĉar estas multe da *aliaj sendungaj laboristoj, kiuj akceptos*. Se mi scias pri tio, inspektoroj prilaboraj devus scii, ankaŭ, kaj agi laŭleĝe kaj monpuni sklavigantojn.

Eble leganto miras pri tio, ke mi uzas la vorton **putino** anstataŭ **hetajro**, **amlaboristino**, **gejšo**, aŭ alia surrogato eŭfemisma. Mi konsideras, ke la unua paŝo por defendi la rajton labori de tiuj virinoj komencas per depostulo de la beleco de tiu vorto, **putino**, eĉ se inter ni, hispanoj, tiu vorto estas uzata komune por paroli malestime pri io: *tu puta madre* (via putina patrino) kiel insulton, *no tengo ni puta idea* (mi havas nek putinan ideon) por troigi la fakton, ke mi ne konas pri io, kaj tiel plu, ĉiam malaltigante la valoron de la afero referencata per la vorto **puta** (*putino*). Sed kiel fari tion? Laŭ mi, uzante la vorton en afabla etoso, kvazaŭ ĝi estas normala vorto, eĉ atendante surprizan aŭ ĝenatan reagon. Oni ne defendas la rajton ekzisti de tiu koncepto kaŝante la vorton, aŭ anstataŭante ĝin per alia *pli mola*, ĉar tion farante oni certigas, ke la vorto, kaj ties signifon, estas malvirta, kaj oni devas vesti ĝin per alia vorto, pruntante ties *pli decan* trajton. Ni

parolu, sekve, pri putinoj, eĉ se **amlaboristo** havas du *honorindaj vestaĵoj*, ĉar amo kaj laboro estas pozitivaj trajtoj, kvankam uzante tiun vorton oni perdas alrigardon al la plej antikva metio el la mondo. Ni rimarku, tamen, ke iam manlaboro ne havis tiun bonan sencon kiel hodiaŭ, ĉar iam homoj, kiuj devis labori por vivi estis malfeliĉuloj, kiuj ne havis socian gravecon. Sed post la Franca Revolucio burĝistoj prenis povon, kaj instaligis la aristokration de mono, kaj monon oni normale akiras per laboro. La mondo maligis tion, kaj nun tiuj, kiuj ne laboras ne estas decaj homoj, eĉ se ili havas multe da mono. Ni ĉiuj deziras esti milionuloj, tamen, ni ĉiuj rigardas milionulojn suspekteme, kaj ne estas malmultaj inter ni tiuj, kiuj diras, ke *neniu iĝas milionulo per honestaj rimedoj*. Ĉu envio? Certe, laŭ mi.

Hetajro havas la aldonan trajton pri saĝeco kaj foreco, ĉar ili estis saĝaj virinoj, kiuj bonfartigis riĉulojn en malnova Grekio, je tempoj pasintaj, kiuj ne revenos, dum **gejšo** estas dolĉa virino, kiu scipovas trakti viron mole kaj plezurige en fora Japanio de antikvaj tempoj. Sed putinoj okcidentaj neniam havis tiujn virtojn, inter kiuj ne la plej malgrava estas foreco, kaj *aparteno al aliaj tradicioj kaj kulturoj*, kaj sekve tion oni devas

rigardi kun respekto.



Ne, inter ni amo estas abstrakta objekto pri kiu oni lernas per si mem, ripetante la samajn erarojn, kiujn niaj antaŭuloj jam faris, kaj ne estas malmultaj tiuj, kiuj konfuzas amon kaj sekson. De tio venas la koncepto **laboristino pri amo, amlaboristino**. Ĉe ni, se oni deziras insulti virinon, oni diras, ke *ŝi estas putino*. Sed jam estas la tempo renversi tiun malestimon trajton de la vorto. Ĉu oni iam pensis pri la malsameco de la signifoj de **puto** kaj **putino**?

Fama putino en malnovaj tempoj estis, onidire, María el Magdalena, inter ni **La Magdalena**,

kiujn oni identigas kun la *publika virino*, kiun Jesuo pardonis kun la konsilo *Foriru kaj ne peku plu*, laŭ la Evangelio de Johano (ĉ. 8, v. 11). Alia fama fivirino estis **Izebel'**, reĝino de Izrael, kiu estis politeisma kaj diboĉa kaj sekve estis forĵetata el sia balkono de ŝiaj servistoj mem laŭ la *Libro de Reĝoj*, en la *Biblio*. Reĝino ja ne estas putino, sed oni aldonis tiun trajton al tiu reĝino por pravigi ties murdo. En pli malforaj tempoj oni trovas la novelon de Aleksandro Dumas, *La Sinjorino de la Kamelioj*, kiu rakontas la vivon de altkvalita putino, ĉar ŝi servis riĉulojn, kaj deziris esti liberigata de Armando, la heroo de la novelo. Jozefo Verdi muzikigis tiun rakonton per opero pli akurate titolita *La Traviata* (*La perdita*), kaj en ambaŭ verkoj estas la funda konsidero, ke putinoj estas malfeliĉaj denaske.




Alia alproksimigo al la temo estis tiu de juna Stephen Crane, kiu je la aĝo 21jara publikigis sian *Maggie, a Girl on the Streets* (Magnjo, knabino de la stratoj), kaj de la titolo mem oni jam vidas, ke ne estas malestimo al putino. Fakte tiu verko estas la unua en usona literaturo, kiun ne diras al leganto pri tio, kion li aŭ ŝi devas opini. La aŭtoro ne juĝas, sed nur metas antaŭ la leganto la faktojn, por ke la leganto mem juĝu, se li aŭ ŝi devas juĝi ion. Magnjo ne estas hetajro, ŝiaj klientoj ne estas riĉuloj, sed komunaj, malriĉaj homoj, kiuj trovas ŝin surstrate. Tamen, la verkisto diras faktojn, kiuj igis ŝin elekti tiun metion.

La verko tremigis konsciencojn en Usono, kaj neniu eldonejo volis publikigi ĝin, kaj sekve la aŭtoro mem devis mempublikigi ĝin, kaj preskaŭ neniu aĉetis la libron, ĝis kiam li publikigis alian novelon, *La ruĝa emblemo de kuraĝo*, kiu baldaŭ iĝis grava kaj konata libro en Usona Literaturo, oni denove atentis al la libro pri Magnjo, kaj konstatis, ke ĝi estas tiom bone verkita kiel la libro pri Henry, la soldato nordisma kaj ties cerbumado ene de la Usona Intercivitana Milito.

La kazo pri Stephen Crane bildigas la aferon iomete pli klare: se tiu, kiu parolas pri putinoj favore aŭ almenaŭ neŭtrale estas

gravulo, oni aŭskultas, sed se nekonatulo aŭ morale obĵetinda homo parolas pri tio, oni profitas



la ŝancon neigi tiujn homojn, putinojn, pri iliaj rajtoj. Honto en socioj, kiuj nomas sin demokratiaj.

Kiel sindikatiĝi, ekzemple. Putinoj en Hispanio sukcesis fondi sindikaton, OTRAS (Organización de TRABajadoras Sexuales, tio estas Organizo de LABoristinoj Seksaj, do OLABS esperante). Tamen, la registaro de Hispanio protestis, kaj volas subpremi tiun rajton al laboristinoj pri amo, kio estas sensenca kaj kontraŭkonstitucia. Fakte ĝi sukcesis diri tribunalon, ke putineco ne estas metio. En Katalunio oni monpunas uzantojn de tiu servo, kaj la registaro de Hispa-

nio volas fari same en la tuta lando. Tamen, anoj de la partio de la registaro, PSOE, ricevis juĝan kondamnon pro la uzo de publika mono en putinejoj. Ĉu ekzistas pli granda hipokriteco?

Tamen, tio pruvas, ke putinecon oni povas persekuti, sed nuligi ĝin estas neeble, ĉar oni ne volas agnoski ties bezono, origino, kaj naturo de putineco, aŭ amservado, se oni tiel deziras referenci al ĝi.

Mi mem provis kompreni la fakton kaj ties originon kaj sekvojn, kaj esploris la aferon pere de mia trilogio *La malnova metio*, kies volumoj estas *La putinuzanto* (2012), *Umu, La ebona hetajro*, (2015), kaj *La putinestro* (2020), el kiuj nur la dua volumo estas tradukita en Esperanton* kaj oni povas senpage legi ĉe nia retejo*.

Je la unua volumo oni vidas la problemojn de Arnoldo, kies problemojn pri virinoj solvas Olivja, profesia putino, kiu iĝis tia pro forrabo de mafio origine; la dua volumo rakontas la historion de infanino, Umu', kiu forkuras el infero en pli mildan inferon de

prostituado, sed pro sia sinsekva laborado ŝi sukcesas eliri tiun mondon malgajan. La tria volumo pris-



Umuo, la ebona hetajro

Jesuo Anĝelo

La dua volumo de la trilogio *La malnova metio*

kribas la vivon de filo de rolulino de la dua volumo, kiu sukcesas mastrumi putinejon per efika kaj klara manieroj. La diversaj oficoj rilatitaj, putino, kliento kaj putinestro, estas prezentitaj kiel normalaj metioj, kiuj estas sociale kaj socie utilaj.

Mi esperas, ke la leganto havos pli justan alrigadon al tiu mondo, kiu fakte apartenas al tiu nia.

* http://www.obracompleta.com/eo/umuo_monato.html

Movado

Voĉmesaĝejo 2 Sen Limoj

Estimata leganto de *Kajeroj el la Sudo*: Ĉu vi parolas Esperanton? Kiom ofte? Kun Kiu? Se ne ankoraŭ, ĉu plaĉus al vi paroli ĝin tute libere kaj senpage ĉiun tagon?

Se jes, mi havas bonan novaĵon por vi: oni ne plu bezonas iri en Kongreson de Esperanto por paroli nian lingvon kun samideanoj. Oni ja povas paroli ĝin kun gesamideanoj de la tuta mondo pere de grupo **Voĉmesaĝejo 2^a Sen Limoj**, Kiun nia samideano Francisco García kreis en Telegram'. Tiu estas programo informadika, kiun oni povas instali en siajn telefonon aŭ komputilon, kaj ĝi permesas al oni paroli kaj —kio estas eĉ pli interesa!— aŭskulti samideanojn el la tuta mondo.

De kiam mi trovis tiun senpagan kaj bonan rimedon por paroli kaj paroligi geesperantistojn, mi ĉiutage parolas kun homoj de Kongo, Brazilo, Nederlando, Hispanio kaj eĉ Irano. Venu en nian mesaĝejon por trovi geamikojn el ĉiu kulturo kaj nacio. Oni diris, ke Esperanto estas lingvo por trovi geamikojn en la tuta mondo, kun kiuj oni povos rilati kaj interŝanĝi spertojn kaj travivaĵojn. Nu, ni ne plu bezonas vojaĝi, sed oni

jam povas vidi kaj paroli kun gesamideanoj, kaj ekscii pri tio, kiel oni vivas en aliaj partoj de la mondo, kaj rakonti al ili pri ni.

Se vi havas poŝtelefonon, vi povas trovi tiun programon, Telegram', ĉe la App Store de iPhone, aŭ Google Store, de Android —fakte ĉe ĉiuj aliaj poŝtelefonaj markoj.

En tiu ĉi grupo oni permesas sendi skribitan mesaĝon, kondiĉe, ke oni aldonos voĉan mesaĝon de almenaŭ unu minuto longa, sed la ideo estas sendi voĉajn mesaĝojn.



Historio

Pri tiuj gereĝoj de Hispanio diritaj Borbonaj

Oni kutime legas deflankismajn artikolojn rilate al la faroj kaj misfaroj de la gereĝoj de Hispanio. Mi ne parolos ĉi tie pri la brilaj regadoj de la **Trastamaraj** kaj **Aŭstria** Gereĝoj, kiuj konstruis la Imperion Hispanan Tutmondan, sed pri tiuj Borbonaj, kiuj perdis ĝin, kaj poste ĝis nuneco.

Mi ne konsideras min mem monarĥiano, sed respublikulo seniluziiĝinta, kaj sekve mi rigardas ilin de alia vidpunkto. Jes: **Karolo 3^a**, alidirite *La Urbestro de Madrido*, estis mezvalora reĝo. **Filipo 5^a** *La Kuraĝiga* estis plej malbona afero, kiu povis okazi al Hispanio, ĉar pro li ni perdis Ĝibraltaron je la fino de la **Sukceda Milito** (en kiu Katalunio partoprenis samflanke kiel Madrido, strange). Li forigis doganon kun tiu hispana regiono, kaj el tiuj pulvoroj venas ĉi tiuj kotoj... Li ankaŭ abdikis en sian filon **Ludovikon**, kiu baldaŭ mortis sen infanoj, kaj revenis li por agi

kiel Reĝo ĝis sia filo **Fernando 6^a** *La Prudenta* —kvankam ankaŭ kromnomita *La Justa*— lin sukcedis. Tamen, dek kvar jarojn poste li mortis, kaj la tria filo de Filipo la 5^a kiu estis reĝo, **Karolo la 3^a**, kromnomita *La Politikisto*, transprenis la tronon de Hispanio. Tio ŝajnas moknomo, ĉar li faris la grandegan stultecon forpeli el la Hispana Imperio la Societon de Jesuo, kiu rifuĝis en la Rusan Imperion. Tio estis sensenca faro ĉar la jezuitoj fondis reton de fortikaĵoj en Ameriko, en kiu ili instruis la indianojn pri diversaj metioj, kaj protektis ilin kontraŭ la rabeco de la portugaloj kaj nederlandanoj, kiuj provis indianojn sklavigi por ilin disvendi. Bedaŭrinde, tiu misfaro ne estis mildigita per la sendo de instruistoj kaj soldatoj al Ameriko anstataŭi la jezuitojn, do la indianoj restis senprotektataj...

Filipo 5^a

Post Karolo 3^a venis entronen sia filo **Karolo 4^a**, unu el la plej stultaj reĝoj de Hispanio, superita pri stulteco nur de Reĝo *Perfida*, **Fernando 7^a**, unue kromnomigita

La Dezirato antaŭ li ekreĝiĝis ĉar



la malkleraj homoj volis, ke li revenu sur la tronon anstataŭ **Jozefo Bonaparto**, senbaze moknomita de la hispanoj *Joĉjo Botelo* ĉar oni diris, ke li ŝatas drinki tro, kio ne estis vera. Eble tiu franca estis la plej bona el la reĝoj, kiuj sidis sur la trono de Hispanio, sed ĉar trudite de fremda potenco, tiu de la imperiestro Napoleono Bonaparte, la popolo agis pro bona fido kaj ribelis sen ŝpari sangon kaj penon, dum tiu **Reĝo Perfida** vivis plej komforte en Francio. La patro kaj filo povintus iri al Ameriko, kiel faris la gereĝoj de Portugalio, sed ili preferis humiliĝi antaŭ la francoj por ricevi personan tranĉon, dum ili ne zorgis pri tio, kio okazis al siaj

subuloj. Kiam Reĝo Perfido revenis al trono, post kiam Napoleono estis venkita, li dediĉis sin al persekuto de tiuj, kiuj defendis lin, pafmortigante kelkajn kaj malliberigante aliajn. Krome, li fermis la universitatojn, ĉar li opiniis ke *la homoj jam scias tro multe*, kaj anstataŭe malfermis Taŭrobatalo-Lernejon en Madrido. Estas juste rekoni ke, inter liaj malmultaj meritoj, li kreis la Prado-Muzeon. Sed ni povus pli bone memori lin, se li konsentintus kun la amerikaj sendependistoj, kiuj proponis, ke oni kreos federacion de nacioj sub la Krono de Hispanio. Sed la malgranda inteligenteco de tiu reĝo ne kapablis kompreni pri kio temis la afero...

Liaj eraroj inkluzivas promulgi la **Salikan Leĝon**, per kiu virinoj ne povas aliri la tronon, por poste nuligi ĝin, tiel kreante skismon inter la hispanoj, kiuj defendis la fraton de la reĝo, princon **Don' Karolon**, kaj la filinon de Fernando, kiu venis al la trono kun la nomo de **Izabelin' la 2^a**. Tio estis la kaŭzo de la **Karolismaj Militoj**. La kvazaŭaj amrilatoj de la reĝino estis unu el la kialoj por ke monarĥa kontinueco estis perdita je 1868, ĉar ŝi estis senpovigita kaj potenco estis tenita fare de generalo Serrano, kaj diversaj regentoj, fakte respublikanaj revoluciuloj, ĝis estis ofertita la krono de

Hispanio al itala princo, kiu regis sub la nomo Amadeo de Saboya (kromnomita *La Kavalira Reĝo* kaj *La Elektita*), dum du jaroj, unu monato kaj unu semajno, je la fino de kiuj li abdikis kaj **La Unua Hispana Respubliko** estis proklamata je 1873, prezidata de **Estanislao Figueras** dum nur kvar monatoj, je la fino de kiuj li estis memekzilita al Parizo *ĉar mi estas ĝis la ovoj de ni ĉiuj*, kiel li diris. Tri



prezidantoj de la Respubliko poste, povo estis transdonita al generalo Serrano, kiu transdonis ĝin al la filo de Izabelin' la 2^a, **Alfonso 12^a** (*La Pacisto*) je 1874, kiu dek unu jarojn poste mortis viktimo de tuberkulozo. Lia vidvino, la regentino **María Cristina**, estus la nura subtenanto de Isaac Peral kaj ties submarŝipo, ordigante konstrui ties prototipon kiu daŭre estas ekspoziciita en Kartageno. Ŝia filo, **Alfonso 13^a** *La Afrikano*, kiu ĝis nun estas la nura hispano kiu naskiĝis kiel reĝo, estis en oficejo ekde sia plenaĝo ĝis 1936, kiam li estis eksoficigita per falsa referendumo —fakte

temis pri municipaj balotadoj en ĉiuj urboj de Hispanio, nekutima kazo ankaŭ— kaj estis establita la **Dua Hispana Respubliko**, kies mallertaj politikoj kaŭzis la Civitanan Militon, kiu kondukis al la **Diktaturo de Generalo Francisco Franco Bahamonde** de 1938 ĝis 1975.

La Diktatoro findeklarigis, ke li *respondekas nur antaŭ Dio kaj Historio*, kaj ordonis, ke post sia morto la monarĥio estu restarigota en la persono de la filo de la heredanto de Alfonso 13^a, **Don Johano Karlo** —kiu efektive estos 1^a kiam estos 2^a, malgraŭ la stratmapon de preskaŭ ĉiuj hispanaj urboj kaj tiom da oficialaj dokumentoj—, posteno kiun li akiris en 1975 kaj okupis ĝis li abdikis en 2014, en la persono de **Don' Filipino 6^a**, hodiaŭa reĝo de Hispanio.

Pri la **Reĝo Don' Johano Karlo**, oni diris multajn aferojn, kelkaj nerimarkindaj, ĉar ili apartenas al lia privata vivo —al kiu li rajtas kiel ĉiu homo—, aliaj falsaj, kaj multaj insolentaj, kiel *li fuĝis al Dubajo por ne alfronti siajn krimajn respondecojn*. Neniu lin persekutis, do estas malvere, ke li fuĝas. Sed oni komprenas, ke kiam oni diras pri li tiom da senbazaj stultaĵoj, ne estas strange, ke li decidis iri al lando, kie oni lin respektas. Inter aliaj sensencaĵoj, oni diris, ke *ĉar li ne*



Reĝo Johano Karlo

plu estas reĝo en oficejo, ke li ne plu estas neimputebla. Sed tiuj, kiuj scipovas legi kaj legis la Hispanan Konstitucion, scias, ke ties artikolo 56-3 diras, ke La persono de la Reĝo estas netuŝebla kaj ne estas submetita al respondeco. Kaj ĉar ne estas diferenco en ĉi tiu dokumento inter la Reĝo Funkcianta kaj la Reĝo Emerita (tiu koncepto neniam venis en la kapojn de la redaktoroj de la Konstitucio), artikolo 56, paragrafo 3 daŭre aplikas, kvankam la televidkomentistoj volas modifi la leĝon sen havi tian kompetentecon. Miaopinie, estis malavara kaj inteligenta gesto abdiki en sian filon, kio multe elstaras en lando, kie neniu

rezignas, eĉ ne la prezidantoj de la Registaroj, kiuj ruinigas la landon per maniero neniam antaŭe vidita.

Kaj la afero estas, gesinjoroj, ke politikistoj en Hispanio ĉiam estis mezvaloraj. Ne estas ke ni havis malmulte da bonŝanco ĉe la reĝoj ekde la finiĝo de la Aŭstriaĵ, sed estas ke la politikistoj, kiujn suferis ĉi tiu kompatinda hispana popolo, estis la plej ruinigaj per ties administradoj. Ŝajnus, ke ili ĉiam iris al sia persona avantaĝo prefere ol al de tiuj, kiujn ili ĵuris servi kaj defendi. Sed la Reĝo ne kulpas pri tio. Ne plu.

Ĉu ni fartus pli bone kun respubliko? (Oni diras la **tria**, sed ĝi estus la **unua**, ĉar la aliaj du ne estis respublikoj, ĉar ili neniam estis ĉies afero). Mi tre dubas pri tio. Por ke estu respubliko, devas esti **demokratoj** unue, kaj **republikuloj** due. Kaj, jam dirite, ankaŭ **republikanoj**. Ĉar por **esti** demokrato, oni bezonas **multe pli** ol diri tion. La **republikuloj** estas tiuj, kiuj **laboras por ke ekzistu respubliko** kaj por ke ĝi **restu** en siaj **republikaj valoroj**, io malfacila en iu ajn lando kaj en tiu nia multe pli, kie la kontraŭa opinio ne estas tolerata. **Respublikanoj** estas tiuj, kiuj komforte **loĝas en respubliko** kaj ne konspiracias kontraŭ ĝi. Kaj ili ankaŭ estas maloftaj inter ni. Nu, dum tiuj du, kiujn ni havis (fakte ili havis, ĉar mi ne estis tie), neniu el la tieaj politikistoj zorgis pri la realaj problemoj de Hispanio, sed pri siaj ideologioj —perversaj, kiel ĉiuj

ideologioj, laŭ mi— kaj neniam edukas sin en demokratiaj
estis preteco servi. Tial ĉu la valoroj kaj libereco kaj
hispana popolo vekiĝas kaj respekto, ĉu Vivu la Reĝo!



Recenzo

Historio de instruistino


Mi ĵus legis libron *Historia de una maestra*, kies esperanta kovrilo estus tiu apuda, publikigita de Eldonejo Santillana je 2012, kiu priskribas la vivon de instruistino de etaj infanoj de 1928 ĝis la komenco de la Hispana Intercivitana Milito, je 1936.

La novelo havas aŭtobiografian valoron, kaj priskribas la diferencojn inter la diversaj urboj en kiuj ŝi laboris, en malgranda vilaĝo hispana, poste en Gineo —tiam nomata insulo de Fernando Poo—, kaj poste en urbeto proksima al urbo Leon', en Kastilio, kie ŝi edziniĝis al kolego instruisto, kiu multe aktivis en maldekstraj movadoj, pro laborismaj aferoj, kaj sekve suferis multe da peno pro tio ene de la respublika tempo en Hispanio.

Tiu libro estas la unua de trilogio, en kiu sekvas *Virinoj nigre vestitaj* kaj *La forto de l' destin'*, kiuj laŭ la aŭtorino, estas fikciaj rakontoj, sed reliefigas la vivojn de filino kaj patrino sur la fundo de la ŝanĝoj, kiujn Hispanio suferis laŭ la jarcento 20^a.

Josefina Aldecoa estis edzino de novelisto Ignacio Aldecoa, el kiu ŝi prenis sian aŭtoran nomon, ĉar ŝi vere nomiĝis **Josefa Rodríguez Álvarez**. Ŝi mem estis instruistino, same

kiel sia patrino kaj avino, kiuj partoprenis la ideologion de la



Institucio Libera pri Instruado, kiu defendis —de la 19^a jarcento — liberecon pri katedro, sendependigante instruadon de dogmoj ĉu religiaj ĉu moralaj ĉu ĉiaj ajn. Tio jam aperas en la maniero pri instruado kaj la reagoj de la ĉefrolulino, Gabriela López, kiam oni provis premii ŝin pri sia metio.

Mi serioze rekomendas la legadon de tiu ĉi libro, ĉar la trilogio estas instruoplena kaj facile legebla.

8 La revido

Sendin' persone konis Sir Roĝeron, kaj ŝi eĉ havis sian telefonon, do ili tri restis unu tagon por trinki kafon, kvankam ili estis kvar ĉar ankaŭ venis Sabin', la unua knabino de Roĝero.

«Kial vi lasis ĝin kun Roŭin', Sir Roĝero?» demandis mia subulin'. La ĵus menciito surprizite rigardis min, sed je mia konsento li respondis:

«Ĉar ŝi ankoraŭ estas tre ĉagrenita pro sia edzo. Ŝi eniris ĉi tien pro ĉagreno, sed ŝia menso ne estas klara».

«Ĉu ŝi ne estis obeema, sinjoro?»

«Vero estas, ke jes, sed tio ne sufiĉas. Diru al ili, Sabin'».

«Ŝi bedaŭris uzi la vipon. Ŝi multe plendis. Estis tede ludi kun ŝi».

Ĉiu el la vortoj de Sabin' trapikis mian animon kiel sageto. Kiel mi povus esti tiel kaptita de ŝi? Mi promesis al mi torturi tiun ĉi perversulinon, kiu kalumniis mian amatinon, aŭ almenaŭ provis tion fari, el sia vidpunkto; nu, de mia, ke ŝi estis malbona subulino donis al mi argumentojn por pardoni ŝin. Mi povus ankoraŭ plenumi mian mision



sen

devi mortigi ŝin. Tiu, kiu ne estis eskaponta, estis Sir Roĝero, malgraŭ lia tuta simpatio kaj liaj proponoj esti mia Elmer' aŭ pli maljuna frato en BDSM, estis malferma sekreto, ke mi ne sciis multon pri tio.

«Vi havas», Sir Roĝero diris al mi, «la koron, la volon de majstro kian mi neniam vidis: klarajn ideojn kaj vi faros tion, kion vi devas fari, senrigarde al la kosto. Kaj tamen al vi mankas metio. Sed tio estas lernebla. Kion oni

neniam lernas, estas tio, kion oni ja havas: koron de mastro. Ni ĉiuj havas iom da tio, knabo, eĉ la plej subulan el ĉiuj gesubuloj, sed vi estas bone ekspedita de tiu kvalito. Estas kvazaŭ kiam ni ceteraj alvenis al la vendejo de la volo, restis nur la pecetoj, ĉar vi jam prenis ĉiujn altkvalitajn varojn».

Kompreneble la vortoj de Roĝero ŝokis min. Ĉu mi malamis ĉe aliaj tion, kion mi vidis pri mi mem projekciita sur ili?

«Sed ne maltrankviliĝu, amiko Marko,» li daŭrigis, «vi povas kalkuli kun mia helpo, miaj konsiloj kaj mia karcero. Kaj se vi iam volas ludi kun du subulinoj, aŭ preni paŭzon de la via, Sabin' estas je via plena dispono».

Tio eĉ pli ŝokis min: mi dubis, ke Roĝero antaŭe diskutis pri tio kun la knabino, sed ŝi ridetis kvazaŭ ŝi ĵus estis komplimentita.

Tiun nokton mi iom pensis, ne povante ekdormi. Mi jam havis subulinon, kaj la knabino, kiun mi amis, dormas kun viro, kiu povus esti ŝia patro. Kaj mi havas duonruĝuluninon, kun kiu mi ne scias, kion fari. Estis amuze, jes, sed mi iris tiun tagon por vidi kio okazas kun Brendin', kaj mi ankoraŭ ne vidis ŝin. Kaj tamen mi trovis egan fonton de informoj. Seksumi kun ŝi estis agrable, precipe ĉar mi ne gustumis sekson

de jaroj. Mi ne komprenis, kiel ĉi tiu knabino tiom ŝatis min, sed mi ne sciis, kion fari kun ŝi, kaj mi ne sciis, kion ŝi faras.

Dum du monatoj mi regis ŝin per telefono: kiam mi ekis, mi eniris budon kaj vokis ŝin. Foje ŝi dirus al mi "laboro", aŭ ŝi simple lasis la vokon haltigi. Tuj kiam ŝi povis, ŝi vokis min por klarigi kial ŝi ne povis akcepti la vokon. Du-trifoje ŝi rekomendis, ke mi aĉetu poŝtelefonon, aŭ permesi, ke ŝi donacu ĝin al mi, sed ŝi renkontis mian firman rifuzon: neniu regos min per tiu aparato. Sed tre ofte ni vidis unu la alian, almenaŭ tri fojojn semajne, kaj iris al kino, al teatro aŭ al koncerto; kaj kiam ŝia patrino estis for, ni restis ĉe ŝia domo, kaj se ne, ĉe mia.

Pere de ŝi mi lernis milojn da anekdotoj pri Brendin', de kiam ili estis knabinetoj ĝis ŝi edziĝis kun Tomas'. Ŝiaj gepatroj neniam estis amuzitaj de la koramiko de sia filino, sed ili devis al kutimiĝi al li. Post la geedziĝo ili vizitis la domon nur unu fojon, kaj ŝi pli kaj pli paŭzigis siajn vizitojn al la domo de siaj gepatroj. Ŝi ĵetis sin en sian Tomason, sed kiam ŝi trovis sin hejme sola dum tiel longe, ŝi decidis reiri al la univeristato. Kiam mi renkontis ŝin, ŝi ĵus gajnis sian juran diplomon antaŭ kelkaj monatoj. Mi jam rimarkis ion specialan pri tiu knabino. Ŝia rilato kun mi estis plenigi la breĉon, kiun ŝia

lastatempe finita kariero lasis al ŝi. Tomas' ne volis, ke ŝi laboru, kaj ŝi ne sciis kion fari pri tiom da libera tempo. Mi metis ŝin en delikatan situacion montrante al ŝi la sekretan vivon de ŝia edzo, kaj tial ŝi rompis la rilaton kun mi. Klara sciis, ke ŝia amikino vidis iun sekrete, kaj mi ne diris al ŝi, ke tiu estas mi, des pli ĉar la rilato jam estis afero de la pasinteco.

Ververe, mi kutimiĝis al Sendin', kaj jam Roŭin' estis io ekzotika, kiu vekis al mi nenian intereson. Estis kvazaŭ la suno subiris, Brendin', kaj mi estis feliĉa kaj kontenta ĝui la pejzaĝojn, kiujn mi malkovris kun la Plena Luno (Sendin'). Sed ne ĉiam estis tiel: kelkajn tagojn post la festo, kie mi renkontis Sendin', mi reiris al la domo de Brendin' kaj rigardis ŝin de malantaŭ mia ĵurnalo, kaj en la sekvaj tagoj mi denove faris tion. Dufoje mi kaptis ŝin rigardante min de sia balkono. La duan fojon mi mallevis la gazeton, rigardis ŝin, faldis la ĵurnalon kaj lasis ĝin sur la benko, forirante de tie por ĉiam. Mi ĵus decidis, ke mi ne plu interesiĝas pri tiu blondulino. Estis tri monatoj da rilatoj abrupte finitaj per ŝia unuflanka decido, kiun mi nek supozis nek komprenis. Sed nun mi ĵus finis la rilaton. Ŝi verŝajne ne ŝatis tion. Aŭ lasis ŝin indiferenta. Aŭ eble ŝi fartis pli bone tiel. Sed la vero estas, ke mi estis tute indiferenta pri tio, kiel ŝi sentas.

«Majstro, ĉu vi ne plu interesiĝas pri Roŭin'?»

«Ne. Kial?»

«Vi demandis min pri ŝi antaŭe. Eble vi konis ŝin de antaŭe... vi neniam diris al mi. Eble vi volas ŝin kiel duan knabinon».

«Eble. Ĉu la unua knabino ne objekto?»

«Ne, ĉar ĉiukaze tio, kion la majstro decidis, estos farita».

«Bone. Venigu ŝin hejmen iam. Sed sciigu min antaŭe».

«Se vi volas, mi alportos ĝin al vi vendrede. Ni estas kune de tri monatoj. Estus bela donaco de via subulino, sinjoro».

«Ĉu vi alportos ŝin al mi kiel datrevenan donacon?»

«Jes. Mi ŝatus».

«Kaj ŝi? Ĉu ŝi tion dezirus?»

«Mi ne scias. Mi demandos».

«Sed ŝi ne konas min».

«Ŝi fidas mian intuicion. Mi scias, ke vi du tre bone interkonsentos».

«Kaj kio pri vi?»

«Mi nenion. Mi estas via unua knabino. Mi scias, ke iam vi havos alian subulinon. Se ŝi estas mia amikino, plej bone por mi».

«Vi ĉiam estos mia unua knabino,

Sendin'. Mi amos vin dum mia tuta vivo, vi vidos».

«Tio estas la plej bela afero, kiun iu ajn diris al mi, mastro».

«Venu ĉi tien».

Mi prenis ŝin je la talio kaj kisis ŝin. Ni jam vivis kune dum dek kvin tagoj, sed tri monatoj da rilato. Dum tiuj naŭdek tagoj ŝi neniam malobeis ordonon, kiel ajn absurda ĝi estis. Nenio rilatas al mia rilato kun Brendin', en kiu ŝi ĉiam finis fari tion, kion ŝi volis. Ĝi komenciĝis kiam ŝi volis, ĉar ŝi enuiĝis, kaj ĝi finiĝis ĉar ŝi decidis, ĉar ŝi koleris, ke mi konsciis pri ŝia malsukcesa gedziĝo. Sekso kun ŝi estis bona, sed ni ne faris tion tiom kiom mi unue supozis.

Roŭin'.

Kiam ŝi finfine alportis Roŭin' hejmen, mi surmetis mian maskon.

«Sendin' diras al mi, ke vi estas ŝia plej bona amikino».

«Jes, sinjoro», ŝi respondis kun humileco, kiun mi neniam esperus. Ŝi ne plu estis la knabino,

kiu malestime prifajfis pri mi.

«Ĉu vi serĉas sinjoron por servi?»

«Ne ĝuste, sinjoro. Se li aperos, li estos bonvena. Se ne, ni atendos».

«Kaj ĉu vi kredas, ke li venos al via domo serĉi vin?»

«Ne sinjoro. Tial mi iras kien mi estas invitita: al festoj, al la domoj de miaj amikinoj...»

Mi rigardis ŝin dum kelkaj minutoj. Mi dormis kun tiu virino sepdek tri fojojn. Sepdek tri estas la kodo por amikaj salutoj inter radioamatoroj, homoj, kiuj interparolas malproksime. Fine mi revidis ŝin, sed ŝi ne plu estis tiu malhumila knabino, tiu, kiu forlasis min sen zorgi pri miaj sentoj, sed pri siaj.

Kaj tamen mi ne tenis rankoron kontraŭ ŝi. Tie ŝi estis, apenaŭ ombro de tiu rimorda virino, kiu nun, defalinta la okulbendon pri sia edzo, rifuĝis en ĉi tiu vivo de depravo, kie la sekso estis la interŝanĝa valuto por aliaj spertoj, oni diras, unikaj.



Daŭrigota...

Defendo de Hispaneco


Ramiro de Maeztu

Preludo

Tiu ĉi enkonduko estis publikigata la 15an de decembro 1931 kiel artikolo-programo de la revuo Hispana Agado. Bonintenca ĵurio elektis ĝin por la premio Luca de Tena tiun jaron. Reprenante ĝin kun la aprobo de la revuo, kie la plej multaj el la artikoloj en ĉi tiu libro unue estis eldonitaj, mi nomis ĝin Preludo, ĉar ĉi tiu vorto ne nur signifas tion, kio komencas ion, sed ankaŭ sugestas, per sia muzika uzo, ke ĝi estas tre speciala komenco, en kiu oni anoncas la temojn, kiuj estos evoluantaj dum la laboro.

Hispanio estas meza kverko sufokita de hedero. La hedero estas tiel folieca, kaj la kardiko estas tiel sulkiĝinta kaj ŝrumpita, ke iafoje ŝajnas, ke la estaĵo de Hispanujo estas en la grim-pulo, kaj ne en la arbo. Sed la hedero ne povas stari memstare. De kiam Hispanio ĉesis kredi je sia historia misio, ĝi ne donis al la mondo de la ĝeneralaj ideoj pli validajn pensojn ol tiuj, kiuj tendencis igi ĝin reakiri sian propran estaĵon. Eĉ ne ĝia Salmeron, nek ĝia Pi y Margall,

nek ĝia Giner, nek ĝia Pablo Iglesias, kontribuis al la filozo-



fio de la mondo unu solan novan penson, kiun la mondo konsideras valida. La hispana tradicio povas modeste montri, sed kiel pozitivajn kaj universalajn valorojn, Balmes, Donoso, Menéndez Pelayo, González Arintero. Ne ekzistas hispana liberalulo, kiu riĉigis la literaturon de liberalismo per ideo, kies valoron rekonas eksterlandaj liberaluloj, nek socialisma tiu de socialismo, nek anarkiisma tiu de anarkiismo, nek revolucia tiu

de revolucio.

Ĉi tio estas ĉar en aliaj landoj liberalismo kaj revolucio estiĝis pro iliaj kulpoj, aŭ kiel puno por siaj pekoj. En Hispanio ili estis nenecesaj. Kion ni bezonis estis evoluigi, adapti kaj apliki la moralajn principojn de niaj juraj teologoj al la ŝanĝoj de la tempoj. La radiko de la revolucio en Hispanio, jam en la komenco de la dekoka jarcento, devas troviĝi nur en nia admiro al eksterlandanoj. Ĝi ne fontis el nia estaĵo, sed el nia ne-estaĵo. Tial, sen la celo ofendi iun ajn, ni povas nomi ĝin la Kontraŭpatrio, kio klarigas ĝian malferundecon, ĉar la Kontraŭpatrio havas sian estaĵon nur en la Patrio, kiel la Kontraŭkristo havas ĝin en la Kristo. Ovidjo parolis pri sankta impeto, pri kiu nutras poetoj: Impetus ille sacer, qui vatum pectora nutrit. La sankta impeto, per kiu oni devas nutri la popolojn, kiuj jam havas universalan valoron, estas ilia historia fluo. Ĝi estas la vojo, kiun Dio montras al ili. Kaj ekster la vojo, estas nenio krom perdo.

Dum dudek jarcentoj, la vojo al Hispanio ne povas esti perdita. Ĝi lernas de Romio la lingvon per kiu siaj triboj povas kompreni unu la alian kaj la organizan kapablon igi ilin vivi kune

laŭleĝe. En la lingvo de Latjo ĝi ricevas kristanisman, kaj kun kristanismo la idealon. Poste venas la provoj. Unue, tiu de la Nordo, kun la ariana fiero, kiu proklamas, ke ĝi bezonas ne Liberiganton, sed prefere Majstron, poste tiu de la Sudo, kie la moralo de la homo estas forlasita al neesplorable destino. Ankaŭ ni hispanoj povis sin forporti de la Kismet. Ni estus nun kio Maroko aŭ, maksimume, Alĝerio. Nia honoro estis ampleksi la Krucon kaj Eŭropon, la Okcidenton, kaj identigi nian estaĵon kun nia idealo. La saman jaron, kiam ni portis la Krucon al la Alhambro, ni malkovris la Novan Kontinenton. Estis la 12an de oktobro, la tago, kiam la Virgolino aperis al Jakvo ĉe la Kolono de Zaragoza. La historia fluo igis nin etendi la Krucon al la nova mondo.

Jen la manuskriptoj de Patro Vitoria. La temo, kiu plej koncer nis lin, estis akordigi dian antaŭdestinon kun la meritoj de la homo. Li ne povis kredi, ke homoj, eĉ ne nur kelkaj homoj, estis malbonaj ĉar la Providenco antaŭdestinis ilin al malbono. Sur ĉiuj mortuloj devas brili espero. Antaŭ ĉio, Pastro Vitoria igis ĝin brili per sia doktrino de Graco. Kelkaj el liaj disĉiploj kaj kolegoj prenis ŝin al la Koncilio de Trento kie ili igis ĝin venki. Ili tiel savis la kredon de homo je la

efikeco de sia volo kaj de siaj meritoj. Kaj tiel komenciĝis la Kontraŭreformado. Aliaj disĉiploj ensorbis ĝin en la Konsilion de la Indioj, kaj inspiris en ĝi la leĝaron de la landoj de Ameriko, kiu trunkigis la konkeron de la Nova Mondo en evangelian entreprenon kaj la enkorpiĝon en kristanismon de tiuj rasoj kiujn la Reĝoj de Kastilio nomis "niaj amikoj la indianoj". Ĉu tiu idealo estas elĉerpita? Ankoraŭ hieraŭ mortis en Salamanko Pastro González Arintero. Kaj lia estas la frazo: "Ne ekzistas teologia propono pli certa ol ĉi tiu: ĉiu senescepte ricevas—proksima aŭ malproksima—gracion sufiĉan por sano".

Ĉu sinsekvaj jarcentoj ellaboris ian idealon, kiu superas tiun nian? El la neebleco de savo li deduktas la neeblecon de progreso kaj pliperfektigado. Diri teologie, ke ĉiuj homoj povas esti savitaj, estas aserti etike, ke ili devas pliboniĝi, kaj politike, ke ili povas progresi. Jam estas devontigo ne malhelpi la plibonigon de iliaj vivkondiĉoj kaj eĉ kiel eble plej multe favori ĝin. Ĉu ekzistas idealo pli alta ol ĉi tio? Ni hispanoj neniam intencis ligi Dion al niaj naciaj interesoj; ni neniam diris kiel Johanino de Arko: "tiuj, kiuj militas kontraŭ la Sankta Regno de Francio,

militas kontraŭ la reĝo Jesuo", kvankam ni certas, ke ni batalis, en niaj bonaj tempoj, la batalojn de Dio. Ni neniam kredis, kiel la angloj kaj nordamerikanoj, ke la Providenco antaŭdestinis nin por esti pli bonaj ol aliaj popoloj. Fieraj pri nia kredo, ni ĉiam estis humilaj pri ni mem. Ne tiel humila, tamen, kiel tiu malfeliĉa Rusio de la revolucio, kiu proklamas la iluzian karakteron de ĉiuj valoroj de la spirito kaj bazas sian idealon sur redukti la homan rason al pure besta ekonomio.

La hispaneca idealo staras. Malproksime de esti malnova novaĵo, ĝi ne estos venkita dum restas nur unu viro en la mondo, kiu sentas sin neperfekta. Kaj kiom ajn oni faros por ĝin forgesi kaj enterigi ĝin, dum duono de la terplanedoj portos hispanajn nomojn, nia ideo daŭre saltos de mistikaj kaj asketaj libroj al la paĝoj de Universala Historio. Se nur eblas al klera hispano vivi kun la dorso al la Historio kaj perdiĝi en la kinejoj, la kafejoj kaj la rubrikoj de la gazetoj! Sed ĉiu ŝtono rakontas al ni pri la sama afero. Kio ni estas hodiaŭ, kion ni faras nun, kiam ni komparas nin kun tiuj hispanoj, kiuj estis nek pli inteligentaj nek pli fortaj ol ni, sed kreis la fizikan unuecon de la mondo, ĉar antaŭe aŭ samtempe ili konsistigis la

moralan unuecon de la homa gento, laŭloke la sama ebleco de savo antaŭ ĉiuj homoj, kun kio ebligis la Universalan Historion, kiu ĝis nia dekseca jarcento ne povis esti nur plureco de nekunigitaj rakontoj? Ĉu povas konsoli nin, ke ni nun estas tiel malproksime de la historio, pensante, ke ĉiu popolo falas kaj ke estis tempo, kiam ankaŭ Ninevo kaj Babilono estis?

Sed kiam ni turnas niajn okulojn al la nuntempo, ni trovas, unue, ke ĉiuj popoloj, kiuj estis hispanaj, daŭrigas la laboron de Hispanio, ĉar ili ĉiuj traktas la malprogresintajn rasojn inter ili kun persvado kaj espero povi ilin savi; kaj ankaŭ ke la urĝa bezono de la tuta mondo, se la kolizio de Oriento kaj Okcidento estas evitinda, estas ke la hispana spirito, kiu konsideris ĉiujn virojn kiel fratojn, kvankam ĝi distingis pli maljunajn gefratojn de neplenaĝuloj; ĉar la hispanoj neniam neis la pruvojn de malegalecoj. Tiel la verko de Hispanio, for de esti ruinoj kaj polvo, estas duonkonstruita fabriko, kiel la Sankta Familio, en Barcelono, aŭ la Almudeno, en Madrido; aŭ, se oni volas, duonvoje falinta sago, atendanta, ke la brako ekprenu ĝin kaj lanĉu ĝin al la celo, aŭ interrompitan simfonion, kiu petas la muzikistojn scii kiel ĝin daŭrigi.

La simfonio estis interrompita en 1700, kiam la okuloj de la sorĉita Monarko fermiĝis por ĉiam. Historiistoj diras, ke, pro trapaso de niaj landoj germanaj, anglaj kaj francaj trupoj, krom la niaj, dum dek kvar jaroj, je la fino de la Sinsekva Milito malaperis ĉiuj malnovaj hispanaj institucioj, krom la krono de Kastilio. Hispanio estis pura skribtabulo, kie fremda Reĝo kaj Kortego povis skribi kion ajn ili volis. Multo de tio, kion ili diris, devis esti dirita, ĉar la lando bezonis "akademiojn kaj metiejojn, aŭtovojojn kaj kanalojn". Kaptita en supera zorgo, ni antaŭe forgesis, ke la unua afero estis vivi. Sed kiam oni diris, ke "ne plu ekzistas Pireneoj", tio, kion komprenis la plej granda parto de nia aristokrataro, estis, ke Versailles estas la centro de la mondo. Ni tiam povis ŝpari energion kaj atendi, ke ĝi estos restaŭrita por daŭrigi nian laboron. Ni preferas meti nian iluzion esti tio, kio ni ne estis. Kaj antaŭ ducent al nura fiziologia vivo, nek anĝeloj vivantaj eterneco ekster tempo kaj spaco. En niaj homaj animoj parolas la voĉo de niaj patroj, alvokante nin al la estonteco, por kiu ili batalis. Kaj kvankam Hispanio doloras nin, kaj ĝi devas doni nin eĉ pli en ĉi tiu laboro, tamen estas pli bone, ke ĝi doloras nin ol doloras nin ne komenci fari tion, kion ni devus.

...daŭrigota



Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj



<http://www.gazetoteko.com/hale/kels122.pdf>

Numero 122- Januaron 2022



ISSN 1886-1938 (printita)
ISSN 1886-1997
Depósito legal: Z-2398-88